

TELEGRAM: SENPAGA TUJMESAĜILO TUTE EN ESPERANTO!

Robin van der Vliet ekde fine de 2015 tradukas la tujmesaĝilon Telegram al Esperanto. En 2018 nova tradukejo estis lanĉita, kun Esperanto. Komence de aprilo 2020 la tradukskipo sukcesis finpretigi la tradukon de ĉiuj disponeblaj versioj. Temas pri 14 196 frazoj!

Telegram estas senpaga nuba tujmesaĝilo. Uzantoj povas per ĝi retbabili, sendi voĉmesaĝojn kaj interŝanĝi bildojn, filmetojn, movbildojn, glumarkojn kaj ĉiajn dosierojn. Ĝi estas disponebla por poŝ-

telefonoj (Android, iOS) kaj komputiloj (Windows, macOS, Linux). Telegram flue sinkronigas ĉiujn viajn datumojn kun ĉiuj viaj aparatoj, kontraste al WhatsApp. Oni povas ensaluti en sian Telegram-konton ĉe pluraj aparatoj samtempe.

Telegram donas pli da ebloj rilate privatecon kaj eblas per ĝi sendi dosierojn ĝis 1,5 GB – WhatsApp estas limigita je 100 MB. Malnetaj mesaĝoj en Telegram aŭtomate konserviĝas kaj estas tuj disponeblaj en aliaj aparatoj.

Kial ek-uzi Telegram?



Privata

Telegram-mesaĝoj estas altgrade ĉifritaj kaj povas memdetruji.



Nuba

Telegram permesas al vi aliri viajn mesaĝojn ekde pluraj aparatoj.



Rapida

Telegram liveras mesaĝojn pli rapide ol ajna alia aplikaĵo.



Disigita

Telegram-serviloj troviĝas dise en la mondo por sekureco kaj rapideco.



Malferma

Telegram havas malfermajn API kaj protokolon senpagajn por ĉiuj.



Senpaga

Telegram estas senpaga por ĉiam. Sen reklamo. Sen abonklotizoj.



Sekura

Telegram sekurigas viajn mesaĝojn kontraŭ kodrompistoj.



Potenca

Telegram ne havas limojn rilate la grandon de viaj aŭdvidaĵoj kaj bablejoj.



Ni povas!

Helpu por igi retbabladon denove sekura – disvastigu Telegram.

Multaj esperantistoj malfidas Facebook, ĉar tiu firmao misuzas datumojn de siaj uzantoj. Tial iuj esperantistoj rifuzas uzi Facebook Messenger aŭ WhatsApp. La sola maniero “moderne” (per tujmesaĝilo) kun ili komuniki, estas do per Telegram.

Por mi persone gravas la plurplatformeco de tujmesaĝilo, ĉar (ekzemple) kiam mi venas hejmen, mi deponas mian kutiman androïdan poŝtelefonon por ŝargado kaj ekuzas alian nur per vifio, aŭ iPad, aŭ komputilon.

Ke eblas facile kaj rapide redakti mesaĝon post sendado tre plaĉas al mi, ĉar ofte mi mistajpas vorton. Kiam mi retbabilas per Messenger, ne eblas facile korekti tion. Necesas kopii, forigi kaj denove sendi mesaĝon. Malagrablas tio.

Ekde kiam mi uzas Telegram-grupojn por la eldonaj projektoj de Petro Desmet’ kaj Lode Van de Velde, nia kunlaboro estas multe pli strukturita kaj nia komunikado multe pliboniĝis.

Dum pasintjara Somera Esperanto-Studado en Slovakio, organizantoj uzis Telegram por ekzemple informi pri lastminutaj ŝanĝoj. Tiu grupo havas pli ol 100 membrojn. En la grupo Esperanto en Rhône-Alpes (regiono de Liono) estas 34 membroj. Ili tie diskutas, kiam renkontiĝi, ĉu vojaĝi kune al renkontiĝo, konigas fotojn ktp. Mi kreis tian grupon ankaŭ por La Verda Stelo kaj por Belga Esperanto-Federacio.

Ĉu ankaŭ vi volas provi Telegram? Informoj en Esperanto aperas en la retejo **www.telegramo.org**

Yves Nevelsteen

Kion vi povas fari per Telegram?



Konekti
de plej foraj lokoj.



Kunordigi
grupojn
ĝis 200 000 membroj.



Sinkronigi
viajn babilejojn
en ĉiuj viaj aparatoj.



Sendi
dosierojn
de ajna speco.



Ĉifri
personajn kaj komercajn
sekretojn.



Forigi
viajn mesaĝojn
per tempumilo.



Konservi
viajn aŭdvidaĵojn
en interreto.



Konstrui
viajn proprajn ilojn
per API.



Ĝui
prikomentadon
de viaj klientoj.